Bulteno de la

# Londona Esperanto-Klubo

2012 septembro-oktobro

LEK-rekontiĝo en Regent's Park (18-08-2012)

## Kluba Programo:

**septembro:**

7 Terry Page: *Naivorele*

14 Komuna vespermanĝo

21 Amika rondo

28 Ron Lynn: *Mia vivo kiel internaciisto* (1800h: konsilantaro)

**oktobro:**

5 Klubanoj: *Rakontoj pri someraj Esperanto-kongresoj, veturoj, ktp.*

12 Olga Kerziouk: *Esperanto-pioniroj de Ukrainio* (1800h: konsilantaro)

19 Hussain Al-amily: *La desertinsulaj disketoj*

26 Sally Phillips: *Esperanto-veturoj en Afriko*

**novembro:**

2 David Thornell: *La Freud-revolucio*

## Esperanta Kalendaro:

**21-24 septembro**: Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Kent (temo: *Familioj)* – kontaktulo: Anica Page (vidu kontaktdetalojn dorse).
**17 -18 novembro**: 24a Eŭropa Rendevuo, Stella Plage, Francio. Informiĝu ĉe http://www.esperanto-nord.org
**27 decembro - 3 januaro 2011**: novjaraj renkontiĝoj, Germanio. 29a Internacia Festivalo, Dortmund www.internacia-festivalo.de; 11a Novjara Renkontiĝo, www.esperantoland.org/nr; 4a Novjara Internacia Seminario, www.esperantoland.org/nis (ambaŭ en Xanten).

## Komuna vespermanĝo

la 14an de septembro

Renkontiĝu je 19:00 ĉe *A Baia* (jes, tiel!), 7 Murray Stret, Camden, NW1 9RE – do nur kelkdekon da metroj for de London Irish Centre, kie ni kutime kunvenadas. La tiea kuirado estas plejparte portugal-stila, sed kun pladoj ankaŭ el Italio kaj aliaj mediteraneaj landoj. (Estas riceveblaj, laŭdire, ankaŭ kelkaj britecaĵoj). Ĵurnala recenzo informis, ke oni tie pagas averaĝe ĉ. £10 por mangxaĵoj, kaj £15 por tuta vespermanĝo kun trinkaĵo - ja moderpreze.

Partoprenontoj bonvolu sin anonci al Terry (vidu *Funkciuloj*), plej malfrue la 11an de septembro, por ke sufiĉa nombro da tabloj estu mendita.

## Kluba retroprojekciilo fordonota!

Ĉi tiu projekciilo staris jam kelkajn jarojn neuzita, ĉar prelegantoj nun preferas alian rimedon. Tamen ĝi ankoraŭ bone funkcias. Se vi deziras posedi ĝin, kontaktu **Terry Page**, kiu pli detale informos, kaj eventuale aranĝos transdonon.Tamen sciu, ke ĝi pezas proks.11kg !

**Se ĝis la jarfino neniu akceptos ĝin, la kluba projekciilo iros al reciklejo.**

## Aliaj anoncoj:

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a oktobro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:
18:00 – 19:15 *beginners' class*
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino




Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)
Metrostacio: Camden Town
Fervojo *London Overground*: Camden Road
Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895; Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Bonrevenon, post tiom da feriado!

Meze de aŭgusto, LEKanoj pasigis agrablan vesperon ekster la klubejo, promenante tra la Parkon de la Regento - de la Suda Pordego ĝis la Bestĝardeno. Ĉiuj ĝuis la okazon, pro bela vetero kaj malmultaj da turistoj. Dank' al **ELENA HIARD**, ni eĉ havas foton por montri al vi! (*Vidu la komencpaĝon.*)

La cetero de la somero estis pli kvieta, kun etetaj kunvenoj en la klubejo, laŭ la somera kutimo. Sed eĉ tiuj estis agrablaj, temante de momento al momento pri la ĉie priparolataj kaj reklamataj Olimpikoj. La vestiblo de la Irlando Centro enhavas grandan televid-ekranon, kiu montris la buntan spektaklon de la Solena Malferma Ceremonio. Aldone, estis iom da vortoj (inter ni du-tri) pri la Antikvaj Olimpikoj.

Ankaŭ meritas dankojn **MAGNUS HENOCH** kaj **MARTENO MINIĤ**, pro ties gvidado de Lingvaj Seminarioj, dum la resaniga foresto de **Prof. JOHN WELLS**, kiu daŭre ricevas bondezirojn de la Klubo.

Informplenan kaj pensigan prelegon prezentis **JOYCE BUNTING**, pri rikolt-eksperimentado je tritiko, per diversaj dokumentoj. Tia prezento kompreneble interesis, en la nuna mondstato.

Surpriza programero (laŭsence de aŭd-ekzercado) estis, "Legu Pervoĉe Preferitajn Tekstojn". Mi mem kunportis kaj laŭtlegis ne longan pecon, atendante same je la alia partoprenantoj. Tamen, ili kunportis kaj laŭtlegis longajn kaj *tre* interesajn kaj amuzajn rakontojn. Mi lernis multon kaj ŝatis ĉion.

Nu, tiom sufiĉas pri 'for'-sezono, ĉu ne? Nun ni antaŭvidas pli da 'zumo' kaj aktiveco - certe per prisomeraj raportoj, renkontiĝoj kun forestintoj kaj pli da prelegoj kaj eventoj. Do, antaŭen!

**Feliĉan Aŭtunon**,
***David Thornell***

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily; Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: Flat 7, 80 Gloucester Ave, NW1 8JD, 020-8752 8147 lek-sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ 01277-228962 arturo@signalprent.demon.co.uk, Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP 01908-564004; terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY 020-8531 1533 acj.rawlinson@ntlworld.com.